

# Svisa Esperanto-Societo informas

1997 numero 5a: decembro

Redakcio: Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

☎ ĉe C.D.E.L.I.: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude Gacond

## Vivo de SES

### Ĝenerala Jarkunveno

Basel: 21 marto 1998

Jam nun je la paĝoj 11-14 ni anoncas, ke la ĝenerala jarkunveno de SES okazos en Basel je la posttagmezo de la 21a de marto kadre de kultura semajnfino anoncita ankaŭ en la najbaraj landoj. Tuj notu la daton de tiu trilanda renkontiĝo en vian agendon kaj ne forgesu ankaŭ tuj aliĝi!

### La prezidanto enketis

En julio Bruno Graf dissendis 25 demandilojn al grupoj kaj aktivuloj por analizi la situacion de SES. Kion la membraro atendas de SES, kion entrepreni por progresi, kiel plibonigi la servojn? El multaj proponoj kaj postuloj li retenas resume tiujn ĉi:

### SES-taskoj, kiuj gravas:

- informi kaj varbi naciskale
- prezenti esperanton al la publiko
- informi regule la inform-mediojn
- informi bone la membraron
- organizi naciajn kaj regionajn kunvenojn
- kuraĝigi kaj helpi la lokajn grupojn
- kunlabori vigle kun JES, KCE, la fakgrupoj, ktp.
- krei favoran etoson.

### Progresigaj agadoj:

- krei propagandan komisionon
- eldoni informilojn kaj varbilojn
- varbi ĉefe inter gejunuloj kaj instruistoj
- krei novan membro-kategorion por la simpatiantoj
- lanĉi novan bildon pri esperanto
- interkomuniki pli kun la lokaj estraroj
- restartigi la agadon *Pro Esperanto*

### Plibonigo de la servoj:

- eldoni *SES informas* pli ofte
- oferti kaj la gazeton *Heroldo de Esperanto* kaj la revuon *Literatura Foiro*

- doni rabatojn al la membroj kaj subteni lokajn projektojn
- redukti la kotizon, ĉefe por la gejunuloj
- ellabori liston pri prelegontoj por la grupoj
- organizi viziton de internaciaj gastoj
- peri kopiojn de *Argus*-sendaĵoj al la grupoj koncernataj

Tiuj sugestoj estis tre utilaj por defini strategion kaj celaron. Efektive multaj el tiuj ideoj eniris la SES-laborplanon. La prezidanto Bruno Graf dankas al ĉiuj respondintoj pro ties kontribuoj.

## Novaj membroj serĉataj

La estraro volas kreskigi la membronombron je 15% ĝis la jaro 2000. Ne eblas, vi diras; eblas, ni respondas. Vetu kun ni kaj helpu al ni atingi tiun celon. Mirakloj okazas ankaŭ en la nuntempo.

Ĉu vi konas esperantiston, kiu ne estas SES-membro? Demandu kaj enketu kaj varbu! Ni rekomencos vin por rekte varbita persono per varbpremio de po CHF 20.-, kiun vi povos subtrahi el via jarkotizo 1998a. Tiu oferto validas ĝis fine de januaro 1998.

Sed ankaŭ SES varbas. Bonvolu sendi al ni adresojn de simpatiantoj, lernintoj, interesuloj. SES dissendos varbleteron kaj informilon al ili. Ni tenos liston de eblaj membroj.

La nuna kotizo estas:

- 12.- infanoj ĝis la 18a jaro
- 25.- gejunuloj ĝis la 29a jaro (anstataŭ 45.- pro subvencio)
- 70.- membroj ekde la 30a jaro
- 100.- geedzoj
- 45.- emeritoj, pensionuloj
- 65.- geedzoj emeritaj

La kotizoj inkluzivas abonon al *Literatura Foiro* aŭ laŭdezire al *Heroldo de Esperanto*.

**Modelo de aliĝilo** (fotokopiota kaj sendota al la prezidanto: Bruno Graf, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen. ☎ 031 921 44 59):

**Mi aliĝas al Svisa Esperanto-Societo**

**Nomo:**

**Naskiĝdato:**

**Adreso:**

**Telefono/Fakso:**

**Dato kaj subskribo:**

**Varbita de:**

Prospektoj kun aliĝiloj haveblas. Ni petas vin ekagi, nepre, kaj antaŭdankas al vi pro la subteno.

## La Estraro aktivas

Okazis du tuttagaj kunvenoj de la estraro en Bern je la 30a de aŭgusto kaj 18a de oktobro. Jen resumaj raportoj pri ili, kiuj certe interesos vin:

- La estraro penas plibonigi la servojn kaj kontentigi la bezonojn

nojn de la grupoj kaj de la membroj. Ekzemplo pri tio estas la decidita transpreno de 50% de la ekzamenkotizoj. Tio stimulu SES-anojn perfektigi kaj akiri diplomon. Do egal ekzamenoj!

- Kelkaj grupoj deziras, ke la estraro helpu por trovi prelegontojn kaj por kunordigi vizitojn de eksterlandanoj. La prezidanto pretigas liston kaj dosieron por subteni la grupojn. Ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds ĉiunonate pasas renomaj esperantistoj, kiuj povus eventuale ankaŭ viziti grupojn. Ni devus pli bone eluzi tiujn ŝancojn.

- La rilatoj inter SES kaj JES plioftiĝis kaj disvolviĝas regula kunlaboro tre dezirinda ambaŭflanke. La estraro proponas redukti la kotizon por gejunuloj ĝis la 29a jaraĝo inkluzive.

- SES ricevis konsiderindan monsumon: Fritz Liechti, Lilly Schärer kaj Margrit Guldin likvidis agadfonduson, kiun siatempempe kreis Otto Walder. Ili ĝiris al nia konto CHF 13'856.- Dankon al la administrintoj pro la decido disponigi tiun monon al SES por agadaj celoj.

- La prezidanto planas specialajn renkontiĝojn en Bern por vigligi la movadon. Ili devus kunigi, kuraĝigi kaj lertigi respondeculojn kaj aktivulojn. Ankaŭ kadre de la ĝenerala kunveno okazu gvidata interŝanĝo de spertoj kaj ideoj.

- Por sia trijara mandato la estraro diskutis kaj aprobis celaron

lige kun la *Kampanjo 2000* de UEA. Tiu laborplano ne konkurencas la *Agadon 2003*, sed kompletigos kaj dinamismigos ĝin.

## **Celaro de SES**

**lige kun la**

### **Kampanjo 2000 de UEA**

La estrara kunveno de la 18a de oktobro 1997 okazinta en Bern aprobis la ĉi-subajn celojn proponitajn de la prezidanto kaj bazitajn sur la laborplano sugestita de UEA.

#### **1. Levi la organizan kaj idean nivelon de SES, precipe plijungi kaj fortigi la societon:**

altigi la membronombron je 15% ĝis la jaro 2000;

okazigi 1 aŭ 2 specialajn aranĝojn jare por funkciuloj kaj aktivuloj kun la celo pliklerigi kaj aktivigi la membraron;

kunlabori regule kun la lokaj kaj fakaj grupoj / societoj por subteni ties bazan laboron;

lanĉi agadprogramon kun ILEI kaj KCE por varbi inter geinstruistoj kaj lernejoj;

lanĉi agadprogramon kun JES por varbi inter gejunuloj kaj junulaj rondoj

krei novan logoon por SES (leterkapo, informilo, ktp)



## 2. Levi la prestiĝon de esperanto kaj de ties komunumo:

restarigi *Informan Servon* por la gazetaro kaj por la publikaj instancoj;

plani 2 aŭ 3 propagandajn projektojn jare por konigi esperanton

produkti modernajn informilojn / varbilojn kaj ellabori konceptojn kaj metodojn por la varbado helpe de laborgrupo;

krei realece kaj kuraĝe novajn bildon kaj perspektivon de esperanto kaj de ties komunumo;

zorge planadi la agadon 2003 (centjariĝo de SES kaj de la esperantiĝo de la pioniroj Hector Hodler kaj Edmond Privat).

## Gazetara servo refunkcias

Pli frue ol antaŭvidite eblis restarigi la *gazetaran servon*, kiu informas redakciojn pri esperantujo. Unua germanlingva bulteno jam aperis en oktobro, kiel montras malgrandigita fotokopia reprodukto je la sekva paĝo 5a.

Ni devis serĉi novajn organizon kaj strukturon. Ne troviĝis kapabulo, kiu povus prizorgi tutsvisan servon. Tial ni decidis dispartigi la aktivecon laŭ la lingvaj areoj. Jenaj personoj akceptis plenumi

tiun gravan taskon: Andy Künzli por la germana lingvo, Claude Gacond por la franca kaj Tazio Carlevaro por la itala.

Devos aperi 2 aŭ 3 bultenoj jare, kiam prezentiĝos aktuala okazaĵo. Redaktoroj ĝenerale represas novaĵojn kaj faktojn ligitajn al realaj eventoj politikaj kaj kulturaj. Jen la sekreto por sukcesa ĵurnalista laboro.

## Venonta estrara kunsido

La proksima estrara kunveno okazos la 24an de januaro 1998. Ĝi pretigos la raportojn al la ĝenerala jarkunveno okazonta en Basel je la 21a de marto. Tiuj tekstoj aperos en *SES informas 1998-1*. Pro tio tiu ĉi revu-numero aperos nur meze de februaro 1998.

### ***S.E.S. informas***

Por la venonta numero de *SES informas*, kiu aperos meze de februaro **la redakcia limdato estas la 26a de januaro 1998.**

(sekvo sur la paĝo 6a)



# LINGVO

INFORMATIONEN FÜR PRESSE UND ÖFFENTLICHKEIT  
DER SCHWEIZERISCHEN ESPERANTO-GESELLSCHAFT

## 30 JAHRE PLANSPRACHEN-ZENTRUM CDELI IN LA CHAUX-DE-FONDS

Am 28. September 1997 fand in La Chaux-de-Fonds eine Jubiläumsveranstaltung im Rahmen des 30-jährigen Bestehens des Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale (CDELI) statt. Das CDELI, eine Abteilung der Stadtbibliothek von La Chaux-de-Fonds, wurde 1967 gegründet mit dem Ziel, alle plansprachlich relevanten Dokumente etwa in Volapük, Esperanto, Occidental oder Interlingua, zu sammeln und wissenschaftlich auszuwerten. Archivar des CDELI ist Claude Gacond.

Info: CDELI, CP 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds.  
Tel. 032 967 68 55.

## KOFFI ANNAN GRÜSST ESPERANTO-WELTKONGRESS

Der 82. Esperanto-Weltkongress fand vom 19. bis 26. Juli 1997 in der australischen Stadt Adelaide statt. Es nahmen 1224 TeilnehmerInnen aus 57 Ländern teil. Das Motto des Kongresses lautete: *Toleranz und Gerechtigkeit in einer multikulturellen Gesellschaft.*

In seiner Grussbotschaft an den Kongress dankte UNO-Generalsekretär Koffi Annan der Universala Esperanto-Asocio für ihr Streben, Esperanto als Sprache zur Vereinigung der Menschen zu fördern und für deren Vorschlag, 1998 das 50jährige Jubiläum der Universellen Deklaration der

Menschenrechte gemeinsam mit der UNO zu feiern.

Die *Universala Esperanto-Asocio (UEA)*, wichtigste Dachorganisation der weltweiten Esperanto-Bewegung, wurde 1908 in Genf von Hector Hodler, dem Sohn des berühmten Schweizer Malers Ferdinand Hodler gegründet. Sie umfasst Landesvereinigungen in 84 Staaten und Mitglieder in über 100 Ländern, so auch in der Schweiz.

Andreas Künzli, lic. phil., Bern, Mireille Grosjean-Robert, Les Brenets/NE, und Marion Bélisle-Grosjean, La Chaux-de-Fonds, vertreten den Esperanto-Weltbund (UEA) bei den Vereinten Nationen in Genf.

## NOBELPREISTRÄGER SELTEN In La Chaux-de-Fonds

Am 24./25. Oktober 1997 wird im Esperanto-Kulturzentrum In La Chaux-de-Fonds eine Begegnung mit dem deutschen Mathematiker, Nobelpreisträger und Esperantisten Prof. Dr. Reinhard Selten (\*1930) stattfinden. Er wird in Esperanto über sein Spezialgebiet *Die Theorie sprachlicher Spiele* referieren, die 1994 mit dem Nobelpreis für Ökonomie ausgezeichnet wurde. Info: KCE, CP 311, 2301 La Chaux-de-Fonds. Tel/Fax 032 926 74 07.

## ESPERANTO BEI DER WAHL DER MISS SCHWEIZ

Anlässlich der Wahl der Miss Schweiz am 20. September 1997 in Genf begrüßte der Moderator das Publikum ausser in den Landessprachen auch auf Esperanto mit den Worten „Saluton kaj bonvenon“ (Grüezi und willkommen).

Die Schweizerische Esperanto-Gesellschaft (Svisa Esperanto-Societo), gegründet 1903 in Rolle/VD, ist ein Landesverband der Universala Esperanto-Asocio, gegründet 1908 in Genf, einer NGO mit Konsultativstatus bei der UNESCO.

Verbandsadresse: Schweizerische Esperanto-Gesellschaft, Jurastr. 23, 3063 Ittigen. Tel. 031/921 44 59.

Redaktion: Andreas Künzli, lic. phil., Eigerstr. 56, 3007 Bern. Tel./Fax 031/372 56 85.

E-mail: andy.esp@bluewin.ch

(Sekvo de la paĝo 4a)

## Agado 2003

Akompanas la decembran numeron de *SES informas* pagilo al la konto 653677-40-1 de SES, kun la espero, ke ĉiuj ĝin malavare utiligos por kreskigi la fonduson de la *Agado 2003*. Jen sciigoj pri la nuna stato de la entreprenitaj aktivecoj:

Tre verŝajne por la unua fojo nia societo lanĉis agadon longdaŭran kun preciza celo, kiun ni rememorigas: atingi la centjaran jubileon de pluraj eventoj kun rezultoj reale videblaj ne nur fare de ni mem, sed ankaŭ de la publiko ekstera al nia medio.

### Esperantiĝo de Hector Hodler

Kiel festi la alvenon al esperanto de la filo de la pentristo Ferdinand Hodler? Tion ni nuntempe pretigas per listigo de la pentraĵoj de la patro, kiuj portretas Hector Hodler kiel bebon, kiel infanon kaj kiel junulon. Mi celas la reprodukon de la koncernaj skizoj, desegnoj, pentraĵoj, kiuj respregulas la kreskon de la fondo de UEA. Necese aldoniĝos klarigoj art-kritikaj kaj biografiaj.

Tiu ĉi verko estos enkonduko al alia libro, kiu intimigos nin kaj la franclingvan publikon kun la plena ĵurnalista verkaro de la

fondinto de UEA kaj kun inspirinto de la fondo de Ligo de Nacioj. La franclingva artikolaro de Hector Hodler aperinta kun la subskribo **Homo** estas almenaŭ same grava, kiel la artikolaro aperinta en la ĵurnalo *Esperanto*. Publikigo de tiu dulingva verkaro kun taŭgaj komentarioj komprenigos la decidigan influon de Hector Hodler en la vivo de Ĝenevo kaj de la tuta mondo. UEA kaj Ligo de Nacioj ne hazarde ekaktivis en lia urbo.

Jam ekde pluraj jaroj Claude Gacond kolektadas la menciitajn dokumentojn. De via financa apogo al la *Agado 2003* iel dependos la ekapero de la antaŭviditaj libroj.

### Esperantiĝo de Edmond Privat

Jam aperis pluraj studoj pri la vivo, la verkaro kaj la influo politika kaj kultura de Edmond Privat. Tamen ĝis nun la ĵurnalista kontribuo de la amiko de Hector Hodler restis neesplorita, ĉar la koncernaj artikoloj aperintaj en multaj gazetoj ne estis facile alireblaj.

Sed nia pola samideano Tomasz Chmielik laboregis por malaperigi tiun ĉi mankon. Vizitinte en somero 1990 la urban bibliotekon en La Chaux-de-Fonds, li malkovris precizan celon al siaj esploroj super Edmond Privat, kiu ludis decidigan rolon favore al la



sendependiĝo de Pollando fine de la unua mondmilito.

Tomasz Chmielik malkovris kelkdekon da kovertegoj, kiuj entenis miksite franclingvajn artikolojn de Edmond Privat publikigitajn en la jaroj 1916-1962. Unue li ordigis ĉiujn ĉi artikolojn laŭ jaroj kaj laŭ revutitoloj. Poste li agrafis ilin al paperfolioj kun ĝustaj indikoj dataj kaj enskatoligis tiun materialon. Sekvis fotokopiado. Tiel ekestis du konsulteblaj kolektoj, kiuj troviĝas en la biblioteka salono Edmond Privat: kolekto da originalaĵoj kaj kolekto da fotokopiaĵoj.

Dua fotokopia kolekto migris al Pollando, kie dum ses jaroj Tomasz Chmielik enkomputiligis ĉiujn haveblajn artikolojn. Nun dankal tiu laboro la tuta artikolaro estas registrita sur disketoj. Sed ordigante tiujn artikolojn li rimarkis multajn mankojn. Tio instigis lin al plia serĉado dum liaj sekvaj restadoj en CDELI. Surloke li povis konsulti jarkolektojn de tri organoj, kies kunlaborinto estis Edmond Privat: *La Sentinelle*, *Coopération* kaj *L'Essor*.

Post iela-tiela kompletigo Tomasz Chmielik preparis la artikolojn el la nomitaj gazetoj por multobligo forme de kajeroj. Li dividis la jarajn kolektojn de *La Sentinelle* en kajerojn kvaronjarajn (jan-mar, apr-jun, jul-sep

kaj okt-dec), de *Coopération* en duonjarajn (jan-jun, jul-dec), kaj de *L'Essor* en jarajn. Jam ekde du jaroj, helpata finance de Tazio Carlevaro kaj de Claude Gacond, li eldonas tiun ampleksan artikolaron de Privat. La kolekto de *La Sentinelle* (1920-1956) formas 148 kajerojn, al kiuj aldoniĝos 37 kajeroj indeksaj por ĉiu jaro. El la kolekto de *Coopération* (1928-1962) aperos 34 kajeroj + 34 kajeroj indeksaj. *L'Essor* (1935-1962) formas 28 kajerojn kun sama nombro da kajeroj indeksaj. En tiuj aldonaj kajeroj oni trovas indeksojn de personoj menciitaj kaj de aliaj propraj nomoj.

La sekva etapo devus esti simila eldono de la kolektoj de *Le Droit du Peuple*, *Le Coopérateur genevois*, *La Cooperazione*, *Le Travail*, se nomi la plej gravajn titolojn de la gazetoj. Atentan studon postulas la jaroj 1916-1920, kiam Privat skribis por multaj revuoj kaj gazetoj aperantaj en Francujo kaj Svislando. Tiu studon kompletigos esploroj pri aliaj gazetoj kaj revuoj, por kiuj Privat kunlaboradis dum sia tuta vivo. Tomasz Chmielik esperas, ke la studindaj jarkolektoj de la koncernaj periodaĵoj troviĝas en la Nacia Svisa Biblioteko en Bern. Por la plenumo de tiu lasta esploro Tomasz Chmielik bezonos restadi en Svislando almenaŭ dum trimonata laborperiodo. Nur post tiu laboro fine ekzistos plena ord-



igita kolekto de la ĵurnalista verkaro de Edmond Privat. Tiam ni povos ekzameni la serĉadon de subvencijaj monhelpoj por ĝia eldono libroforme.

Helpe de la multobligita kolekto, kiun Tomasz Chmielik nuntempe publikigas Claude Gacond provos kontakti la redakcion de *Coopération* en la espero, ke povos eldoniĝi antologio de la plej signifaj artikoloj de Privat aperintaj en la koncerna gazeto. La koncernajn kontaktojn Claude Gacond ekhavas, kiam Tomasz Chmielik estos finproduktinta plenan kolekton de ĉiuj artikoloj aperintaj en *Coopération*.

Nepre necesos, ke kapablaj kunlaborantoj franclingvaj prinotu kaj prikomentu tiujn artikolojn el historia kaj politika vidpunktoj. Kaj estus dezirinde, ke la eldonota antologio aperu en dulingva kolekto franca kaj esperanta. Do kapablaj esperantigontoj estas serĉataj.

Paralele al tiu laboro Tomasz Chmielik ankaŭ ekplanadis la esperantigon de la franclingvaj verkoj de Edmond Privat. Ĝis nun li aperigis la broŝuron *Liberté doctrinale et sincérité* (Liberokaj doktrina kaj sincero) en traduko de Juanita Turbillon reviziita de li mem kaj de Claude Gacond. La broŝuro aperis fotokopie en 1993. Poste sekvis la traduko de *Le Chancelier décapité* (La

konceliero senkapigita) fare de Thierry Flachon. Ekzistas ankoraŭ du tradukoj de Flachon: *La Pologne sous la rafale* (Pollando sub ŝtormo) kaj *La Pologne attend* (Pollando atendas). Tiuj tri verkoj estas nuntempe fotokopie eldonataj.

Ĝis nun Tomasz Chmielik ne-lacigeble daŭrigis sian laboregon. Sed la eldono mem de antologio de la plej signifaj artikoloj kaj de la esperantigitaj verkoj dependos de la rimedoj de la *Agado 2003* kaj de subvencijaj apogoj, kiujn Claude Gacond provos malkovri.

### Svisa Planlingva Enciklopedio

Ekde 1992 Andy Künzli kolektas materialon pri la historio de la planlingvoj en Svislando. La celo de liaj klopodoj estas eldoni verkon kun la titolo *Svisa Planlingva Enciklopedio*, kiu prezentu historiajn skizojn pri la diversaj planlingvaj movadoj en Svislando kaj biografiojn de ties adeptoj. La akcento sendube reliefigos la sukcesojn de esperanto, sed oni trovos ankaŭ multajn indikojn pri la historio de Volapük, Ido, Occidental, Interlingua, kaj aliaj planlingvaj movadoj, kiuj ludis rolon en Svislando kaj de iliaj adeptoj, kiuj agis en Svislando. Ĝis nun estis kolektitaj informoj pri pli ol 400 planlingvanoj, ĉefe esperantistoj. Samtempe, multaj

temaj *frapvortoj* povis esti plenigitaj kun konvena enhavo.

La laboro antaŭeniras ja konstante, sed kun neeviteblaj interrompoj, pro diversaj kialoj. Prokraston kaŭzas ankaŭ la retajpado per IBM-komputilo, kiun Andy Künzli akiris intertempe. Tio donas samtempe la okazon nove redakti la tekston.

Pli kaj pli klara fariĝas la koncepto de la volumo(j), malpli klara ties financado. Andy Künzli unue antaŭvidis eldoni la verkon jam en 1998 okaze de la centa datreveno de la unua publika prelego pri esperanto en Svislando. Sed tre verŝajne nur ĉirkaŭ la jaro 2003 fine realiĝos la antaŭvidita eldono.

Andy Künzli konscias, ke la komencita laboro estas granda, longdaŭra klopodo, kiu dependas grandparte de li persone kaj kiu bezonas multe da pacienco kaj persisto, se oni volas serioze trakti la aferon. Tio gravas, ĉar indas aperigi maturan verkon, al kiu povos fidi ne nur ĝiaj averaĝaj uzantoj, sed kiu estu ankaŭ serioze konsiderata de la fakuloj. Tiel ĝi fariĝos reala bazo por novaj esploroj.

Estas rimarkinde, ke jam nun la kolektita materialo helpas la pretigon de aliaj esploroj. Ĝi do jam vigligas la exploremon pri historiaj eventoj iel en rilato kun esperanto kaj planlingvistiko. Oni komprenas do, ke la tuta

entrepreno estas subteninda de la *Agado 2003*.

## Raporto pri la Metodika Tago

de la 15a de novembro en Bern

Tiu unua metodika renkontiĝo iniciatita de nia prezidanto Bruno Graf celis la didaktikan ekformiĝon de utiligantoj de la perbilda kurso: *Enkonduka kurso de esperanto*.

13 instruemuloj ricevis tiun enkondukan klerigon. Jen la listo de tiuj esperanto-instruantoj, kiuj rajtos utiligi la koncernan perpildan kurson, kies nomo en la lingvoj franca, germana kaj itala estas:

### *Cours d'initiation à l'espéranto* *Esperanto-Einführungskurs* *Introduzione all'esperanto*

Nicole **Béroud-Focke**, Basel  
Franz **Brügger**, Emmenbrücke  
Sonja **Brun**, Rotkreuz  
Bruno **Graf**, Ittigen/Bern  
Mircille **GrosJean**, Les Brenets  
Ueli **Haenni**, Zollikofen  
Jean-Jacques **Lavanchy**, La Tour-de-Peilz  
Nicole **Margot**, Lausanne  
Stanislaw **Pochanke**, Wil  
Vera **Pochanke**, Lausanne  
François **Randin**, Lausanne  
Christiane **Sixtus Pot**, Perly/Genève  
Jean-Thierry **von Büren**, Savagnier

Kontraŭ pago de CHF 40.- ili komencis ricevi la instrumaterialon: 2 afiŝarojn je formato A3, kiujn Claude Gacond disdonis



al ili surloke Li prezentis ilin diversmaniere:

**unue** per kelkaj teoriaj konsideroj;

**due** per instru-demonstracio kun esperanto-komencanto, kiu ĉeestis kiel observanto. Tiu vizitanto bone ludis sian rolon de kobajo, kvankam li ne estis absoluta komencanto!

**trie** per detala prezento de ĉiuj afiŝoj kun la necesaj didaktikaj konsideroj;

**kvare** per kelkaj esperantologiaj konsideroj, kiuj rivelis, ke la lingvo-kono de la ĉeestintoj estas pli preskriba, ol reale preskriba. Tiu manko rilate al konoj metodikaj estas grava handikapo, kiu malfavoras la lanĉon de perfektigaj kursoj kaj la rilatadon kun fakuloj pri lingvistiko kaj pri la lingva instruado en la publikaj lernejoj.

La partoprenintoj al la metodika tago ricevos perpoŝte la sekvan instru-materialon:

a) afiŝ-prezentilon facile muntebla;

b) didaktikan gvidilon je formato A4;

c) specimenan kolekton de la stud-materialo disdonota al la lernantoj. Fotokopiado ebligas reprodukti tiun ĉi materialo laŭ la necesaj kvantoj.

Jean-Jacques Lavanchy, kiu praktikis la koncernan instru-metodon per la lumbilda projekciado, klarigis kiel efika montriĝis

tiu ĉi enkonduka kurso, kiun li regule funkciigis paralele al la semajnfinaj prelegoj ĉe KCE dum dudeko da jaroj. Li laŭdis ĝian modernigon sub la formo de afiŝaj pend-kajeroj. Tiu nova formulo estas multe pli fleksebla, ol la antaŭa, kiu dependis de du diapozitiv-serioj, de projekciilo kaj de travebla ekrano, do de multekosta aparataro ne tre facile transportebla.

La nova formulo ebligas instrui ie ajn: ne nur en klasejo, sed ankaŭ en simpla hejma salono, ekstere en ĝardeno aŭ eĉ en herbejo okaze de migradaj haltoj. Por la efiko mem de la instruado, la lernantaro ne devas superi 15 ĉeestantojn, kies aĝo estu minimume 11 jaroj. La kurso konvenas do por la instruado ne al infanoj, sed al liceanoj, al plenkreskuloj en vesperkursoj aŭ en societoj, al gepatroj kaj instruistoj okaze de malfermo de esperanto-kursoj en lernejoj, ktp.

La instruado estas plene efika, nur se la didaktikaj konsiloj estas fidele obeataj. Tial Claude Gacond decidis disvendi la koncernan instru-materialon nur al la personoj, kiuj ricevos la necesan metodikan formiĝon. Interesotoj por aliaj metodikaj rendevuoj sin anoncu. Por ili li organizos novajn renkontiĝojn.

(Sekvo sur la paĝo 15a)



SVISA ESPERANTO-SOCIETO (SES)  
ESPERANTO-SOCIETO BASEL (ESB)  
TRILANDA REGIONA ESPERANTO-KLUBO (TREK)

kore invitas vin al

## SES Ĝenerala Jarkunveno Kultura Semajnfino Trilanda Renkontiĝo

sabate kaj dimanĉe la 21-an/22-an de marto 1998  
en la kunveno de la evangelia/metodista eklezio,  
Riehring 129, Bazelo

Ni klopodis organizi interesan programon dum kiu ankaŭ la amikeco ne malprofitas. Eksterlandanoj rajtas partopreni la tutan sabatan programon, ankaŭ la redevuon de aktivuloj kaj la ĝeneralan jarkunvenon de SES.

Por komencantoj estos enkonduka E-kurso kaj pli lertaj povas trapasi 1-an gradan ekzamenon, se kandidatoj prezentigas ĝis 31.1.98. Certe ankaŭ la prelego de Claude Piron kun diskuto estos interesa por ĉiuj.

Distra vespero, kantado kun Claude Piron kaj filmo de Francois Randin.

Dum la rondirado dimanĉe matene vi konatiĝos kun parto de nia malnova urbo, kiu estas interesa kaj varioplena. Ankaŭ la tuj posta vizito de la Tingueli-muzeo estas unika epizodo dum tiu semajnfino.

Por ke la restado ne fariĝu tro multekosta ni interkonsentis, ke anstataŭ en multekostaj hoteloj ni ofertu ankaŭ tranoktadon private ĉe esperantistoj. Junuloj havas la eblecon senpage tranokti en la kunveno, sur matracoj planken, sed ili kunportu unu littukon por meti sur la matraco kaj dormsakon. Alia ebleco estas la junulargastejo. Plie ni povas oferti po unu hotelon en Svislando, en Germanio kaj en Francio.

---

# PROGRAMO

---

## SABATO

HORO	GRANDA SALONO	MEZA SALONO	ETA SALONO
9.30		Ĝen. Kunveno de SAEF	
10.30	Rendevuo de aktivuloj; interŝanĝo de spertoj	Kurso por komencantoj	Ekzameno 1-a grado
12.30	Tagmanĝo		
14.00	SES Ĝenerala jarkunveno	Kurso por komencantoj daŭrigo	Ekzameno daŭrigo
16.00	Kafumado		
17.00	Prelego de Claude Piron: "Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de Esperanto" kun diskuto		
19.00	Vespermanĝo		
20.30	Distra vespero, kantado kun Claude Piron Filmo "La Alpoj Svisaj" de Francois Randin Mallonga enkonduko pri la Tinguely Muzeo kun dia (proksimume) Tranoktado		
22.30			

## DIMANĈO

9.30	Rondirado tra la malnova parto de Bazelo kun klarigoj
11.00	Vizito de la Tinguely Muzeo
13.00	Tagmanĝo kaj adiaŭo

Programŝanĝoj rezervitaj

**Mapon kun indiko de la loko, vi ricevos post la aliĝo**

*Prezoj en svisaj frankoj (CHF)*

Rendevuo de la aktivuloj		senpage
SES ĝenerala jarkunveno		senpage
1-a grada ekzameno (membroj de SES 50%)		50.--
Tagmanĝo sabate	salato, rizo	12.--
	(A) gratinita ĝinko (B) gratinitaj ovoj legomoj, deserto	
Kafumado		senpage
Aliĝo al la kultura semajnfino	ĝis 31.01.1998	20.--
	ek de la 01.02.98	30.--
	infanoj ĝis 15-jara	senpage
E-kurso/vespera programo/rondirado: en la aliĝkotizo inkludita		
Muzeo (por la membroj de SES senpage)		5.--
Vespermanĝo	rakledo, deserto	10.--
Tagmanĝo dimanĉe	salato, nudeloj	12.--
	(A) kokidaj femuroj (B) Tofu tranĉita karotoj, deserto	

**Aliĝilon bonvolu sendi al:**

**Esperanto - Societo Basel, Postfach 103, 4005 Basel**



## **Aliĝilo**

**Ĝiuj devas aliĝi ĝis la 10-a de marto 1998**

familia nomo: .....

Individua nomo: ..... Tel.: .....

Adreso: .....

Pkc: ..... Urbo: .....

Dato: ..... Subskribo: .....



### Prezoj por tranoktado

- A Private ĉe Esperantisto senpage  
 B En la kunvenejo (kunportu littukon + dormosakon) senpage  
 C Junulargastejo 2 lit/1 lit (plurlita ĉambro) CHF 75.40/26.30  
 D Hoteleto en DE 'Krone' 2 litoj/1 lito DEM 100.--/70.--  
 E Hotelo en FR 'Europe' 2 litoj/1 lito FRF 380.--/290.--  
 F Hotelo en CH 'Rochat' 2 litoj/1 lito CHF 180.--/120.--

Ciuj tranoktadoj inkluzivas la matenmagon

Al la hotelo en DE vi povas kunveturi

**Atentu:** de la 13.-22.03. en Bazelo okazas la "Mustermesse" dum tiu granda foiro la hoteloj en la tuta regiono estas premplenaj. Kiu volas tranokti en hotelo tuj aliĝu. Ankaŭ la aŭtomobilistoj havos malfacilaĵon trovi parkejon.

**Aliĝu** tranoktadon al ni, sed pagu surloke kie vi tranoktas.

Via aliĝo nur validas post ricevo de la aliĝkotizo kaj la reston vi pagu surloke ĉe via alveno. Sed vi nature rajtas ankaŭ pagi la tutan aranĝon inkl. manĝoj kaj muzeo kiam vi aliĝas.

Bonvolu ĝiri la sumon al PC 40-287185-5, Esperanto-Societo Basel, Trilanda, Postfach 103, 4005 Basel, ĝis plej malfrue la 10-an de marto 1998. Dankon!



Notu viajn dezirojn kaj antaŭpagon. Detaloj por menuoj Vd. p.3

		<u>mi antaŭpagas</u>
<input type="radio"/>	aliĝkotizo: ĝis 31.1. 20.-- poste 30.--	
<input type="radio"/>	rondirado tra la urbo	--.-- inkludita
<input type="radio"/>	muzeo <input type="radio"/> membro (senpage)	5.--
<input type="radio"/>	Esperanto-kurso por komencantoj	--.-- inkludita
<input type="radio"/>	1-a grada ekzameno <b>25.-/50.-</b>	
Menuo: sabate tagmeze A <input type="radio"/> B <input type="radio"/>		12.--
sabate vespere rakledo <input type="radio"/>		10.--
dimanĉe tagmeze A <input type="radio"/> B <input type="radio"/>		12.--
Mi tranoktas en (Bv. noti la literon) <input type="checkbox"/> 2 litoj <input type="radio"/> 1 lito <input type="radio"/>		
<input type="radio"/>	mi ne tranoktas	bonvolu <input checked="" type="radio"/> kion vi deziras

(Sekvo de la paĝo 10a)

Sed kiel estis anoncite, la instru-materialo estos pli kosta, ĉar la prezo de CHF 40.- estis lanĉa prezo, kiu apenaŭ kovras la produkto-kostojn. La reala aĉet-prezo ĉiam tre modesta, estos tre verŝajne CHF 60.-

Aliaj kursoj, kiuj celos la instruadon al progresantoj kaj al kandidatoj al ekzamenoj, estas nun redaktataj.

Post duonjaro nova metodika tago povos esti anoncita. Ĝi alportos la didaktikajn konsilojn al la utiligo de tiu instru-materialo, kiu ne celas anstataŭi la tradiciajn lerno-librojn, sed ludi nur kompletigan rolon.

Por utiligi tiun didaktikan materialon la instruantoj devos nepre akiri minimumajn lingvistikajn kaj metodikajn nociojn ĝenerale nekonatajn en la esperanto-mondeto. Por efike instrui lingvon, oni devas koni ties lern-malfacilaĵojn. Tiurilate, almenaŭ en Svislando, tre malmultaj nunaj esperanto-instruantoj ricevis la necesan formiĝon. La venontaj metodikaj tagoj estos do enkonduko al tiu ĉi formiĝo, ĉiam kun samtempa lertiĝo al la uzo de praktikaj instruiloj.

# Movada vivo

## CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, Biblioteko de la Urbo, Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds, enirejo: pordo nord-orienta. ☎032 967 68 55. Fakso: 032 967 68 29.

### Publikiginda disertaĵo

CDELI estas frekventata de studentoj, kiuj efektivigas sciencajn esplorojn en rilato kun esperanto mem aŭ kun planlingvistiko pli ĝenerale.

Kelkfoje esploringo havas la ĝentilecon havigi al CDELI specimenon de sia disertaĵo. Tion ĉi faris Nikola Markarian kun la akompano de afabla letero kun dankoj pro mia helpo. Mi citas ŝin:

*Jen finfine kopio de la disertaĵo kun kiu vi helpis min lastsomere. Mi multon lernis farante ĝin kaj tre dankas vin denove pro la diversaj utilaj sugestoj kaj kuraĝigaj vortoj, kiujn vi donis al mi en CDELI.*

Nikola Markarian prezentis sian franclingvan laboraĵon en la Universitato de Surrey (Britio) sub la titolo *Contre la Tour de Babel: quel avenir pour l'espéranto dans la France et dans l'Union Européenne?* Fakte ŝia studo meritis publikigon pro sia noveco en la maniero prezenti

esperanton kaj pro la statistikaj informoj, kiujn ĝi alportas per la analizo de originalaj sondadoj ĉe francoj esperantlingvaj kaj ne-esperantlingvaj.

Claude Gacond

## Esperanto perkoresponde

Poŝtfako 5031 2305 La Chau-de-Fonds 5

### Raportas Claude Gacond

La perkoresponda kurso de esperanto por franclingvanoj funkcias nun en tria reverkita versio multe pli kompleta, ol la antaŭa versio, kiu estis jam tre efika. Ĝi esperantigis iom pli ol 1400 personojn ĉefe en Svislando, Francio, Belgio kaj franclingva Afriko.

La lernantoj ricevis novan lecionon nur kontraŭ resendo de test-folio, kiu konkludis ĉiun ĉapitron. Mia unua aktiveco de emerito estis la perkomputila analizo de la test-folioj de la 13 ĉapitroj de la kurso. Tiuj analizoj reliefigis la didaktikajn mankojn de mia kurs-programado kaj la lern-malfacilaĵojn proprajn al la franclingvanoj.

Post 6 monatoj de intensiva laboro, kiam tiuj 18'000 folioj estis trastuditaj, mi povis komenci la reverkon de la kurso. La ĉefaj plibonigoj estas aldono de legaĵoj kaj de multaj kompletigaj klarigoj kaj ekzercoj. Nun naŭ lecionoj estas jam riceveblaj.

Tion anoncas informilo titolita *Information sur l'espéranto* eldonita je 250 ekzempleroj, kiun mi daŭre reeldonos kun la necesaj aktualigoj. Mi pretas sendi je la dezirata kvanto tiun tre efikan informilon al ĉiuj, kiuj povos ĝin disdoni al konatoj, ĝin aldoni al societaj dokumentoj, ĝin proponi al redaktoroj de klubaj bultenoj, ktp. Interesatoj pri tiu varbado petu specimenan ekzempleron aŭ tuj la necesan disdonotan kvanton.

## ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instrulstoj  
Prezidanto de la Svisa ILEI-Sekcio: François  
RANDIN, Valombreuse 14, 1004  
LAUSANNE.

### Decido

La 15an de novembro okaze de la Metodika Tago en Bern la membroj de la Svisa ILEI-Sekcio decidis, ke Claude Gacond renkontiĝos kun Giorgio Silber por fin-redakti la punktojn, kiuj ankoraŭ mankas en la ekzamena regularo de SES-KCE. Ilia laborbazo estos la protokolo aperinta en *SES informas* 1997-4 p. 10/12.

Iliaj decidoj estos senditaj por definitiva aprobo al la komitato de la sekcio pere de ties prezidanto François Randin.



# JES

**Junularo Esperantista Svislanda**

Adreso: CP 32, 2416 Les Brenets.

## Raportas Marion Bélisle

Post jam kelkjara tradicio okazis ankoraŭ ĉijare la ĝenerala asembleo de JES en Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds (22.11.1997).

Vigla grupo da junul(in!)oj debatis dum pluraj horoj pri la aktivecoj de la asocio, dum ne malpli vigla grupo da komencantoj malkovris la sekretojn de la esperanta gramatiko sub la gvidado de Claude Gacond. La vesperon ni ĝoje pasigis ĉirkaŭ rakleda fajro, kaj dimanĉon de nove kun entuziasmo kursadis.

La ĉefa atingo de la pasinta jaro estas la membriĝo de multaj novaj homoj (12), kio altigas nian membraron al preskaŭ 30 gejunuloj. Tiu kresko ĉefe estas la rezulto de la bona kunlaboro de esperantistoj en Lausanne (JES-anoj kaj membroj de la laŭzana grupo), kaj de la tiea printempa kurso por komencantoj. Ni provos estonte okazigi tiajn kursojn ankaŭ en aliaj urboj.

Plej grava problemo nuntempa estas manko de redaktoro por nia gazeto: *La Alpa Kanguruo*. Ĉijare jam ekpaneis la gazeto, kaj ni nun provos ankoraŭ trovi novan redaktoron. Ni ankaŭ pridiskutis alternativajn solvojn.

Niaj celoj por la venonta jaro estas ĉefe kunlaboro kun SES pri varbado de gejunuloj kaj organizado de kursoj, kaj ekkontaktoj kun CSAJ (Svisa Konsilio de Junularaj Asocioj), kio eble povos gvidi al pliaj ontaj kunlaboroj.

La datoj de la venontjaraj renkontiĝoj 1998aj estas:

28an de februaro /1an de marto: Skisemajnfino en Meiringen.

21/22ajn de marto: Trilanda renkontiĝo kaj SES-jarkunveno en Basel

21/22 de novembro: JES-ĉefkunveno.

Aldoniĝas partopreno en kutimaj internaciaj aranĝoj

La novelektita komitato de JES estas:

Dawid Pochanke, prezidanto

Juliane Ineichen, vic-prezidanto

Chiara Fabbri, kasisto

Vera Pochanke, sekretario

Celestina Kuhl, renkontiĝoj

Marion Bélisle kaj Sarah Siksou, informado kaj eksteraj rilatoj

## KCE

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311, 2301 La Chaux-de-Fonds. ☎/fakso: (032) 926 74 07

La oktobra monاتفino kun la Nobel-laŭreato Reinhard Selten renkontigis 17 interesatojn kaj 8 la novembra kun Birthe Lapenna pri ties edzo **Ivo Lapenna**.

## Novjara renkontiĝo

De la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro 1998: feriado kun silvestra nokto, lerno de ŝakludaj sekretoj kun Nicola Palladino, ligno-arto kun Tamas Szabo, filmoj, ekskursoj.

## Monatfinoj en 1998

Notu jam la ĉisekvajn datojn kaj temojn en via venontjara agendo:

**Januaro 24/25:** *Asembleo de KCE + La suvereneco de la ŝtatoj* kun Sonja Koleva, juristino.

**Februaro 21/22:** *Ludoviko Zamenhof, la okcidentano* kun François Degoul, zamenhofologo.

**Marto 28/29:** *Fonetikaj aspektoj de esperanto* kun Daniele Vitali, fonetikistino.

**Aprilo 25/26:** *Renkonto kun István Nemere*, verkisto.

**Majo 30 / junio 1:** *Pentekosta migrado en la ĵurasa naturo* kun naturamika fakulo.

## TEJO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

**Seminario pri Edukado al Paco**  
Raportas Marion Bélisle, organizanto

En la junulargastejo de La Chaux-de-Fonds okazis dum la dua semajno de oktobro la seminario de TEJO pri la temo *Edukado al Paco*.

Preskaŭ tridek gejunuloj de tre diversaj landoj kuniĝis por spertiĝi pri la temo kaj krei internaciajn kontaktojn (inter ili kvar membroj de JES). La seminario traktis la temon *Edukado al Paco* el du kompletigaj vidpunktoj. Unuflanke la partoprenantoj povis konkrete konsciiĝi pri propraj antaŭjuĝoj kaj efiko de malegalaj rilatoj pere de tre diversaj "ludoj" proponitaj de Charly Maurer (Svislando) kaj Sabine Trenner (Germanio). Aliflanke variaj prelegoj prezentis iom pli abstrakte la kongresan temon. Mireille Grosjean (Svislando) prezentis solvodon de konfliktoj kaj efikon de interŝanĝaj aktivecoj, Claude Gacond (Svislando) prelegis pri la svisaj esperantopioniroj en la pacema agado, kaj Yves Lador (Svislando) enkondukis la juran aspekton de homaj rajtoj.

Cetere la partoprenantoj ankaŭ mem prezentis elektitajn temojn. Ĉio tio rezultis en plene plena programo, kiun tamen ĉiuj ĝuis, ŝajnas. Distra parto ne mankis. Unutaga ekskurso al la rivero Doubs kaj al la famaj subteraj muelejoj sukcesis ankaŭ korpe lacigi la partoprenantojn... Same plaĉis al multaj la enkonduko al aikido (japana pacema batalarto) gvidata de Mireille Grosjean. Plej amika tamen estis la "interkultura vespero", dum kiu ĉiuj kuiris tipajn manĝojn el sia hejma lando.

La seminario sukcesis ankaŭ veki interesigon ekster esperanto, ĉar plezure multajn eĥojn ni trovis en la gazetaro post tiucela komuniko. En deko da gazetoj aperis la komuniko, same germanlingvaj kiel franclingvaj. Dum la semajno ni ankaŭ ricevis la viziton de RTN 2001 (loka radio), RSI (Svisa Radio Internacia) kaj Canal Alpha + (loka televido), kiuj per kontribuoj de la partoprenantoj prezentis ĉefe la lingvon esperanto.

La TEJO-seminarioj okazas regule du-foje jare, en diversaj landoj de Eŭropo, kaj pri diversaj temoj. La venonta okazos dum printempo 1998 en hispana Eŭskio, kun la temo *Homaj Rajtoj*. La seminarioj ricevas financan subtenon de la Junulara Fondumo de Konsilio de Eŭropo, kaj kelkfoje de privataj fondadoj (ĉi-jare de la svisa fondumo Rencontre 2001).

## Grupa vivo

### Basel

#### Esperanto Societo Basel

PF 103, 4005 BASEL. ☎0049 76 214 57 12.  
Kunveno: 20.00 en Altersheim, Neubad.

La venontaj kunvenoj okazos je la 22a de januaro kun fonduo ĉe Erna Döring, Klingelbergstr. 11, 4056 Basel. ☎061 261 70 68. Al-

iĝo ĝis la 19a de januaro; 19a de februaro: Ĝenerala kunveno; 3a de marto, 23a de aprilo, 28a de majo, 25a de junio, 27a de aŭgusto, 24a de septembro, 22a de oktobro, 26a de novembro. Notu tiujn datojn en via agendo.

Dum la kunveno de la 23a de oktobro diskutiĝis la organizo de la trilanda renkontiĝo okazonta je la 21/22aj de marto. Nicole Bérout trovis aron da helpemuloj. La 27an de novembro prelego de Claude Gacond venigis dudekon da interesatoj, inter kiuj juna migranta paro el Pollando. Ĉiuj aĉetis dokumenton, kiu komparas du versiojn de letero de L.-L. Zamenhof al Alfred Michaux: la zamenhofan tekston mem kaj modernigitan reverkajon de Claude Piron. La studo de ambaŭ versioj alportas sciigojn pri la vivo kaj judeco de Zamenhof kaj samtempe informojn pri la gramatika kaj stila evoluo de esperanto ekde 1905 ĝis nun. Ĉiuj partoprenintoj certe daŭrigos hejme la fin-esploron de tiu dokumento, kiu bone respiegulas la vivantecon de esperanto kaj la tiamajn zorgojn de Zamenhof.

## La Chaux-de-Fonds

### Esperanto-studo

La duajn kaj kvarajn merkredojn de la monato inter 19h45 kaj 21h45: studo de esperanto kun Claude



Gacond en la C.D.E.L.I-salono. Se la enirpordo estas ŝlosita: sonorigu.

La venontaj studvesperoj paroligaj okazos je la 10a de decembro, 14a kaj 28a de januaro 1998, 11a de februaro, 11a kaj 25a de marto. Ĉiuj komencantoj kaj progresantoj estas bonvenaj. ☎032 967 68 55.

## Genève

### Esperanto-Grupo "La Stelo"

PF 188, 1211 GENÈVE 20. ☎022 740 04 45 **Kunvenoj:** 18.15 en Restoracio Manora, Cornavin 4.

## Lausanne

### Laŭzana Esperanto-Societo

PF 389, 1009 PULLY. ☎021 729 58 02

**Kunvenoj:** 20.30 en la Stacidomo, 1-a etaĝo. La venontaj kunvenoj okazos je la 12a de januaro, 2a de februaro: ĝenerala asembleo, 2a de marto, 6a de aprilo kaj 4a de majo. La venontaj diskut-rondoj en hotelo *Continental* okazos je la 26a de januaro, 15a de februaro kaj 23a de marto ekde la 18h ĝis la 20h. Notu tiujn datojn en via agendo!

La informilo de Laŭzana Esperanto-Societo komencis havi kolorojn. La decembra numero anoncas, ke la zamenhofa festo malfermiĝos la 14an de decembro je la 14h30 per rendevuo en la restoracio *Le Delta* en Pully.

## Neuchâtel

### Esperanto-studo

La trian merkredon de la monato inter 19h45 kaj 21h45: paroliga studo de esperanto kun Claude Gacond ĉe Gabrielle Gacond, Emer-de-Vattel 58, 2000 Neuchâtel. ☎ (032) 725 48 45. Komencantoj kaj progresantoj estas bonvenaj. La venontaj renkontiĝoj okazos je la 21a de januaro kaj 18a de marto.

## WIL

### Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil. ☎071 911 68 30. **Kunvenoj:** 20.00 en la Restoracio Schweizerhof, Unt. Bahnhofstr. 18.

**Januare 7:** Interesaj esperanto-leteroj kaj travivaĵoj en esperantujo.

**Februare 4:** 5a Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-Semajno en Sant Carles de la Rapita (Katalunio) kun lumbildoj. La renkontiĝo okazos en la hejmo de familio Pochanke (adreso supre). Rakontos B. S. Pochanke.

**Marto 4:** Ludovespero gvidata de L. Senhauser.

## ZÜRICH

### Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH. ☎01 25 150 25 **Kunvenoj:** 19.15, Eisengasse 22, 8034 Zürich.

# Nekrologoj

Raportas Claude Gacond grandparte dankal la materialo kolektita de Andy Künzli por la *Svisa Planlingva Enciklopedio*.

## Hans Bipp

La 4an de novembro mortis en Birsfelden nia honora membro Hans Bipp en la aĝo de 85 jaroj. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam li devis retiriĝi en hejmon por maljunuloj, li donacis al CDELI sian riĉan esperanto-dokumentaron, kiu respegulas lian efikan aktivecon kadre de la fervojista movado.

Hans Bipp naskiĝis la 21an de majo 1913 en Wil (SG). Esperanton li lernis en sia 16a jaro en 1929 en kurso gvidata de Rudolf Gottlieb Maeder. Baldaŭ li fariĝis tre aktiva esperantisto precipe kadre de SAEF, al kiu li aliĝis en 1932 dum siaj studoj en la trafika lernejo de St. Gallen (1931-1933), kie li lernis la profesion de stacidoma oficisto.

Dum restado duonjara en Londono li perfektigis en la praktiko de la angla lingvo kaj tuj poste li deĵoris ĉe diversaj staci-

domoj en Romandio (1936-1939), ekregante ankaŭ la francan lingvon. Kaj li revenis Alemanien por labori kiel informeja oficisto en la ĉefa stacidomo de Zürich, antaŭ ol estri la informejan oficejon en Zürich-Paradeplatz kaj eniri la Ĝeneralan Direkcion de SBB/CFF en Bern kiel administra oficisto. Ankaŭ viglan familian vivon li havis kun siaj 7 gefiloj.

Post la dua mondmilito li restarigis SAEF, per la kreo de provizora estraro kun Emil Keiser. Li transformis la SAEF-amikaron al bone organizita asocio, serĉante kontaktojn kun kolegoj en ĉiuj lingvaj areoj de Svislando. Kadre de SAEF li plenumis la funkciojn de kasisto (1950-52, prezidanto (1952-56) kaj komisiito (1969-72). Dum la kvindekaj jaroj li gvidis esperanto-kursojn en la stacidomo de Zürich.

Internacie li aktivis kadre de IFEF, partoprenante ties kongresojn ekde la unua en Aarhus en 1949, kaj prezidante la LKK-n de la 7a en Zürich en 1955. De 1975 ĝis 1989 li aktivegis kadre de la Terminologia Komisiono por la traduko de la 6-lingva "Ĝenerala Vortaro de Fervojaj Terminoj" de Internacia Fer-

voja Unuiĝo. IFEF eldonis la koncernan vortaron en 1989.

Hans Bipp trovis ĉe la francaj kolegoj inspiron, kiu sugestis al li en 1952 la fondon de Svisa Unuiĝo Arta kaj Intelekta de Fervojistoj (UAISF). Ties unua vicprezidanto li fariĝis. En tiu ĉi organizaĵo Hans Bipp plenumis la funkciojn de estrarano kaj delegito ĝis la jaro 1972, kiam li ricevis la titolon de honora membro.

Okaze de la 50-jara jubileo de SAEF en 1975, kun Kurt Greutert, Hans Bipp verkis detalan historion de SAEF, kiun publikigis la revuo *Svisa Fervojisto*.

Povu nia nekrologia rememorigo esprimi nian kolektivian dankemon al tiu esperanto-pioniro, kies efika aktiveco estas reale impresiga.

## Maŭro De Sassi

Ne estis facile redakti nekrologian artikolon pri nia samideano Maŭricio aŭ Maŭro de Sassi, kies vera individua nomo estis Maurizio, ĉar pro modesteco li malofte akceptis paroli pri si mem. Li naskiĝis en Zŭrich la 28an de marto 1909 kiel filo de tiĉina elmigrinto, kaj mortis ankaŭ en tiu urbo la 11an de januaro 1997.

Tre frue li perdis siajn gepatrojn, unue la patron, kiam li

estis tre juna, kaj la patrinon, kiam li estis nur 17jara. Tial li konatiĝis kun la tiama sociala mizero propra al sia tiĉina patrujo. Ankaŭ lia edzino Helen apartenis al elmigrinta medio. Ŝia familio forlasis Ruslandon dum la unua mondmilito. Ambaŭ fariĝis konvinkitaj kaj aktivaj pacistoj, migremaj kaj sportemaj naturamikoj kaj li mem aktiva membro de la Svisa Partio de la Laboro.

Maŭricio trovis laborlokon kiel librotenisto ĉe la zurika maŝin-fabriko Bŭhrle, kiu produktis ankaŭ armilojn. Tio lin morale suferigis kaj igis lin malavare subteni porpacajn agadojn, inter kiuj li situigis esperanton.

Malgraŭ sia modesta deveno, Maŭricio de Sassi atingis multrilate grandan klerecon. Lingve li estis poligloto, administre li estis tre kapabla konsilanto, naturscience li estis ideala gvidanto en migradaj restadoj. Lia politika aktiveco esprimiĝis ne nur kadre de la komunista partio nacilingva, sed ankaŭ esperante tra KEK (Kolektivo Esperantista Komunista). En la naturamika movado li gvidis viglan esperanto-sekcion. En la ĝenerala svisa komunumo li diligente plenumis plurajn funkciojn kiel SAT-peranto, kiel kunlaboranto de KCE por ties kas-kontrolo, kiel membro de la Kultura Komisiono kaj kiel prezidanto de la Komisiono



Esperanto Lernejen. En Zürich li aktivis kadre de la loka grupo.

Por mi mem li fariĝis tre kompetenta konsilanto por la verkado de la *Enkonduka kurso de esperanto* kaj de alia instru-materialo. Dum dudeko da jaroj ni renkontiĝis tre regule en labor-kunvenoj metodikaj, kaj ĉiam li estis plenuminta sian taskon kun ekzempla akurateco kaj reala kompetenteco.

Liaj esperanto-libroj kaj dokumentaro, kiun CDELI heredis tra perado de Dietrich Weidmann, per sia konsisto mem respegulas tre interesan personecon, kiu ne nur bone konis la originalan esperanto-literaturon, sed ankaŭ havis tre precizajn sociajn pri-okupojn. Tial la koncerna dokumentaro ege riĉigis la CDELI-kolektojn je verkoj ne tre konataj de la averaĝa esperantistaro.

## Marcel Erbetta

Marcel Erbetta malkovris esperanton komence de la kvin-dekaj jaroj pere de sia pedagogia aktiveco kadre de la instruista Freinet-movado. En 1951 li aliĝis al la esperanto-kurso, kiun organizis Bruno Graf en lia urbo Biel/Bienne kaj jam la postan jaron li utiligis esperanton por interlernejaj interŝanĝoj.

Marcel Erbetta naskiĝis en Saint-Imier la 9-an de decembro 1911. En tiu ĵurasa urbeto li komencis en 1931 sian instruistan karieron en la elementa lernejo kaj konatiĝis kun Mariette Thiébaud, kiu instruadis la francan, la anglan kaj la kant-arton en la duagrada lernejo. Li fakiĝis pri la instruado de la germana per restadoj en Germanujo. En 1937 ili geedziĝis kaj en 1945 ili translokiĝis en Biel/Bienne kun siaj 3 gefiloj, inter kiuj ambaŭ filinoj Jacqueline kaj Lucienne esperantiĝos. Liaj konoj de la germana ludigos al li aktivan rolon rilatigan en la pedagogiaj medioj de lia dulingva urbo. Tio akirigos al li statuson de kunlaboranto de la porinstruista lernejo por la formado de junaj instruistoj, kiuj staĝis en lia klaso. Li aktivis en la organizaĵo *Société pédagogique romande* kaj en komisionoj de la social-demokrata partio kaj internacie en la movado Freinet, kies internacian kongreson li organizis en la friburga regiono Gruyères. En 1956 lia didaktike efika entrepreno **Graĵnoj en Vento** komencis dinamismigi internaciajn kampanjojn de instruado de esperanto en lernejoj elementaj kaj dugradaj. Li grupigis la interŝanĝemajn klasojn en rondoj kaj centrigis la eldonadon de iliaj kajeroj.

Per tiuj dikaj broŝuroj trifoje jare la lernantoj, apud la propra kontribuado, trovis kontribuadojn el dekduo da aliaj klasoj. Tiu pedagogia agado ricevis la moralan apogon de la *Konsulta Komisiono pri Lernejoj* de UEA kaj de *Esperanto-Edukistaro de Svislando*, sed finance ĝi ĉefe dependis de la propraj rimedoj de Marcel Erbetta. En la jaroj 1957/67, kiam kulminis tiu aktiveco, funkciis 11 rondoj (biela, aŭstra, franca, angla, zagreba, jugoslava, slovena, estona, bulgara kaj urugvaja)

La entrepreno iom post iom interrompiĝis ĉirkaŭ la jaroj 1970, kiam malvigliĝis la eksperimenta instruado de esperanto, pro la enkonduko de pli frua kaj pli sistema instruado de la naciaj lingvoj. Ne plu restis loko por eksperimentoj favore al esperanto, malgraŭ la ripetataj pruvoj, ke tiu instruado igas pli sukcesa la instruado de la fremdaj lingvoj.

Marcel kaj Mariette Erbetta amikiĝis kun István Szerdahelyi (1924-1987) okaze de ILEI-konferencoj. Estas pere de ilia per-

ado, ke ilia amiko István konatiĝis kun la interlingvistika riĉeco de CDELI.

Marcel kaj Mariette Erbetta apogis tre aktive ĉiujn provojn renkontigi klasojn, kiuj estis lernintaj esperanton. Oni trovas ilin en somera rondvojaĝo tra Jugoslavio en 1959 okaze de pedagogia seminario en Celje (Slovenio). En julio 1960 kun Jugoslavia Esperanto-Federacio, Grajnoj en Vento kunorganizis la unuan Tutmondan Seminarion por Geknaboj kaj Geinstruistoj sur la insulo Krk (Kroatio). Pro manko de financa apogo fare de UEA kaj de la ĉefaj esperanto-organizaĵoj, tiuj fruktonaj eksperimentoj ne povis ripetigi. Ili superis la monrimedojn de sindonemaj instruistoj. Tial senkuraĝiĝo, malbonfarto pro akcidento kun motorbiciklo, iom post iom silentigis nian kolegon post lia emeritiĝo en 1976. Konklude al sia esperantokariero li ŝatis ordigi la mirindan materialon, kiu estis en lia posedo, por ke en CDELI ĝi estu baldaŭ konsultebla de estontaj kolegoj.

Aldonaĵo kunsendita (1):



Empfangsschein / Récépissé / Ricevuta

Einzahlung Giro

Versement Virement

Versamento Girata

Einzahlung für / Versement pour / Versamento per

Einzahlung für / Versement pour / Versamento per

Mitteilungen / Communications / Comunicazioni

CREDIT SUISSE  
8022 ZH-RATHAUSPLATZ

CREDIT SUISSE  
8022 ZH-RATHAUSPLATZ

AGADO 2003



Zugunsten von / En faveur de / A favore di

Zugunsten von / En faveur de / A favore di

653677-40-1 4862

653677-40-1 4862

CS ZUERICH-RIGIPLATZ

CS ZUERICH-RIGIPLATZ

SVISA ESPERANTO-SOC.

SVISA ESPERANTO-SOC.

CASE POSTALE 779

CASE POSTALE 779

2301 LA CHAUX-DE-FONDS

2301 LA CHAUX-DE-FONDS

Konto / Compte / Conto 80-2372-3

Konto / Compte / Conto 80-2372-3

Fr.  c.

Fr.  c.

Giro aus Konto  
Virement du compte  
Girata dal conto

Einbezahlt von / Versé par / Versato da

Einbezahlt von / Versé par / Versato da



Die Annahmestelle  
L'office de dépôt  
L'ufficio d'accettazione

000000000008620653677400015+ 070486279>

800023723>

P + A SA -4.97 9'000'000

PTT 442.03